



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 4
1968

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
34-a (39-a) jaro
Monata

RIMPREDIKO

Kiam danoj aŭ norvegoj kantas la tre ŝatatan himnon «Skriv dig, Jesus, på mit Hjærte» ili apenaŭ scias, ke tio estas nura parto de longa himno, kiu estas tipa ekzemplo de la rimpredikoj de sia tempo.

Verkis ĝin la fama dana episkopo kaj himnoverkanto Thomas Kingo (1634—1703), kaj vi retrovas la strofon kiel n-ro 15 en la poemo de 29 strofoj. Certe la nunaj himnologoj tiel elektis, ĉar tiu strofo estas la plej valora, kaj ĝi estas la strofo kiu ankaŭ nun havas himnan vivon. La cetero nur havas literaturan intereson, nun, kiel ekzemplo de la tiatempa maniero verki.

1.

Vi, singultaj ĝemoj venu
el profundo de la kor',
kaj neniu vane penu,
ke silentu mia plor',
ĉar l' okul atestu pri
la funebro, kiun mi
en animo mia portas
dum Jesuo vee mortas.

2.

Ĉiu, kiu sur la tero
vivas, bone scias nun
pri la pekoj kaj mizero
kaj pri la kruela pun':
Ĉar la Dia Filo al
morto iras en batal'
kontraŭ peko kaj satano
pro plej eta hominfano.

3.

Jus al morto kondamnita
nun Li venas, vidu jen
Liajn vundojn, ho spirito,
kiel dorna krono en

la tempiojn pikas dum
Li nun iras al krucum',
sub la kruco nun Li mutas
dum la sango flue gutas.

4.

Pensu do pri la mizero
kaj aŭskultu al la spir',
al la ĝemoj de sufero
dum la sanĉelema ir'.
Blua, sanga, tamen sur
Lia dorso, kie nur
vundo apud vundo estas,
peza kruc' ankoraŭ restas.

5.

Ne demandu pri l' vestaro,
ruĝa pro la sanga flu',
ĉar pro ĉiu peka faro
nun suferas Krist' Jesu'.
En kalkanon la serpent'
pikis Lin per sia dent',
nun turmentas Lin veneno
laŭ la vortoj de l' malbeno.

Forts. side 54

1968: JARO DELA HOMAJ RAJTOJ

Nova mondskala granda kampanjo de UEA kontraŭ la lingva diskriminacio: esploroj kaj studoj, artikoloj en la revuo «Esperanto», specialaj dokumentoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, nova revuo «La Monda Lingvo-Problemo» en naciaj lingvoj kun ampleksaj resumoj en Esperanto.

Donu vian apogon per tuja aliĝo kiel Membro-Abonanto de UEA!

Kotizoj de UEA en Norvegujo: Membro kun Jarlibro kr. 25,00, Membro-Abonanto kaj Membro-Abonanto kun «Kontakt» kr. 50,00, Membro-Subtenanto kr. 75,00, Juna Membro kun Jarlibro kr. 12,50, Juna Membro-Abonanto kr. 37,50. La kotizojn oni pagas al la ĉefdelegito de UEA, S-ro Alfred Skyberg, kies adreson vi trovas sur la lasta paĝo de ĉiu numero.

UNESKO - novahoj

MUZEO CIOLKOVSKIJ

En Kaluga, Soveta Unio, uni antaŭ nelonge inaŭguris kosmonaŭtikan muzeon nomitan memore al unu el la pioniroj de kosmonaŭtiko, Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij (1857—1935). La inaŭguro koincidis kun la 10-jara datreveno de la lanĉo de la unua artefarita satelito. La muzeo enhavas gradan kolekton da objektoj rilataj al kosmonaŭtiko, aviado kaj raketa tekniko, i.a. la unuaj sovetaj eksperimentaj raketoj lanĉitaj en 1933, la sputnikoj kaj lunikoj, laŭtomata interplaneda stacio Venera kaj la kosmoŝipo Vostok, en kiu Gagarin unufoje veturis en la kosmon, en aprilo 1961. La muzeo posedas ankaŭ elektronan «Informan Servon», kiu kapablas respondi 800 demandojn pri la kosmo.

K. E. Ciolkovskij estis konata ankaŭ pro sia interesiĝo pri la lingva problemoj. En 1934 li membriĝis al Sovetrespublikara Esperantista Unio.

JURNALO REPRESITA PER SATELITO

Epokfara tago en la historio de ĵurnalismo estis la 17-a de oktobro 1967. En

tiu tago Londona ĵurnalo transsendis unu paĝon trans Atlantikon al San Juan en Portoriko — per la satelito «Early Bird». Tio estis la unua tiaspeca uzo de satelito, sed en estonteco oni verŝajne ĉiam pli ofte aplikos la saman metodon por rapidigi la distribuon de ĵurnaloj tra grandaj distancoj.

La oficejo en Fleet Street elsendis unu paĝon el sia ĵurnalo «Daily Express» pere de unupaĝa faksimil-sendilo Muirhead. Lapaĝo atingis la oficejon de «El Mundo» en San Juan pere de la satelito, en formo de foto-negativo, el kiu oni poste faris preskliaĵon.

AUROVILLE — LA UNUA «MONDA URBO»

La 28-an de februaro 1968 oni Lokigis sur konstruejo apud Pondiĉeri en Hindujo la fondo-ŝtonon de nova urbo: Auroville, dekomence planita kiel ideala urbo. Lau la ĉef-arhitekto, s-ro Anger, la intenco estas, ke iam Auroville fariĝu la unua «Monda Urbo», kien povus veni ĉiu ajn persono, ĉu sen pasporto, ĉu kun ia «internacia pasporto», kaj ke fondiĝu ankaŭ aliaj tiaj urboj — eble en Sud-Ameriko aŭ en Eŭropo. En Auroville estos tri ĉefaj lingvoj: la tamila (la plej granda lingvo de suda Hindujo), la angla kaj la franca. Ĉiu, kiu volas kontribui al la konstruo de nova socio, estos tie bonvena, same tiel la sciencistoj de la movado Pugwash kiel ankaŭ la 'hipioj' usonaj. La projekton subtenas la Hinda Registaro, kaj ankaŭ aliaj registaroj interesiĝas. Unesco donas sian moralan apogon.

FILM-KONKURSO HOMAJ RAJTDOJ

Okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj (1968) organizas film-konkurson pri tiu temo la Internacia Konsilo de Grafikaj Asocioj (Icograda). Ĝi invitis studentojn de artaj kaj grafikaj lernejoj kaj de film-lernejoj tra la mondo konkursi per filmoj, kiuj ilustros la principojn de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Limdato: 1 majo 1968. Detale informas: Icograda, P. O. Box 868, Amsterdam, Nederlando.

(Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,
1/8 p. kr. 19,—.

Sciigoj de N.E.L

La kontorfondajo. La nuna oficejo estas gravega helpo por nia laboro, sed sen ekonomia subteno flanke de la membroj ni ne povas tenadi ĝin. Dankante al ĉiuj malvaraj helpantoj ni apelacias al ĉiuj, kiuj havas okazon, sendi donacojn, ĉu malgrandajn, ĉu grandajn. Tiel vi helpos firmigi la laboron por Esperanto en Norvegujo.

La Propaganda Fondajo. Samtempe ni memorigas ankaŭ pri la tre grava Propaganda Fondajo. Jam plurfoje ĝi ebligis al ni plenumi gravajn aferojn, sed por ke tio povu daŭri, la fondajo bezonas pliajn enspezojn. Estas evidente ke ju pli granda fariĝos la fondajo, des pli utila ĝi estos.

«Vivo de Zamenhof». Kiel oni scias, N.E.L. transprenis la reststokon de la norveglingva eldono de la fama verko de Edmond Privat, kaj ni vendas ĝin por la treege malalta prezo de kr. 3,00. Ĉar la librostoko ligas grandan parton de la malgranda kapitalo de N.E.L., estas grave forvendi la librojn laŭeble rapide, kaj ni rekomendas al la membroj amase aĉeti ĝin. Ĝi aparte taŭgas kiel donaco al homoj,

kiujn vi deziras varbi por nia movado.

Raporto de la Liga Estraro pri la 1a jarkevarono. Okazis 2 estrarkunvenoj. Oni elsendis unu cirkuleron al la kluboj. Oni decidis reaperigi Esperanto-nytt kaj komisiis al la estro de la Informa Fako efektiviĝi la decidon laŭeble baldaŭ. Oni decidis ne redukti la paĝnombron de Norvega Esperantisto dum la printempo. Oni klopodos aranĝi prelegvojaĝon por la hindo A. Halder aŭtune. Oni decidis starigi la bibliotekon en la malnova oficejo. Oni akceptis inviton de la klubo en Løten aranĝi la 41an Norvegan Esperanto-Kongreson tie en 1969. N.E.L. fariĝis membro de «Den Norske Komité for Det Internasjonale År for Menneskerettighetene 1968». Oni laboras pri kongresvojaĝo al Madrido kaj pri revizio de la taskoj. N.E.L. heredis la Esperanto-librojn de f.ino Dordi Johansen.

La Liga Estraro.

LA UNUA JMJ

Antaŭ kelka tempo oni povis legi en «Esperanto», la oficiala organo de UEA, ke Norvegujo ne havas eĉ unu JMJ! — JMJ signifas juna Membro kun Jarlibro. Ĉu tio estis vera? Ĉu Norvegujo elstaru tiamaniere?

Unu el niaj kluboj reagis tuj. Oni simple donacis — kiel premion por fervoro — tian membrecon al unu el la junaj membroj, kaj sendis la kotizon, kr. 12,50, al la Ĉefdelegito.

Povas esti, ke junuloj ne trovas, ke ili povas pagi tiom por fariĝi JMJ. La kluboj povas helpi. Malgranda ellotado en unu sola kunveno sufiĉas por membrigi unu junulon.

Ni aplaŭdas la klubon, kiu tiel agis, kaj instigas al ĉiuj norvegaj kluboj fari same.

Estas ja la jaro de la 60-jara jubileo de UEA.

TEJO informas

KVINCENT GEJUNULOJ ESPERANTISTAJ

Praha — «La nombro de junaj geesperantistoj en nia lando en tiu ĉi momento superas 500.» — jen la kuraĝiga informo de la Junulara Sekcio de la Ĉeĥoslavaka Esperanto-Komitato. Direktas la agadon precize ellaborita laborplano, seriozeco, oferemo, entuziasmo, kaj konsiderinda scio pri progresemaj labormetodoj (parte pro la dum 1967 okazinta seminario pri tiu kaj similaj demandoj). Oni esperas pri baldaŭa formiĝo de memstara Esperanto-junulara organizo en Ĉeĥoslovakio.

HINDAJ STUDENTOJ AGITAS PRI LINGVO

Delhi (News Features) — Studentoj en multaj hindaj urboj violente enmiksiĝis en ankoraŭ plia lingva disputo. Kaŭzo de la novaj tumultoj estis parlamenta akto kiu retenas la anglan paralele kun la hindia kiel oficialajn naciajn lingvojn, ĝis ĉiuj ŝtatoj decidis adopti la hindian. Tumulto komenciĝis en la hindia universitato de Banaras en novembro, kaj okazis poste demonstracioj en Agra, Lucknow kaj Delhi. La demonstracioj fariĝis tumultoj, kaj pluraj konstruaĵoj estis difektitaj. Ĉefministro Gandhi en parolado emfazis la neceson de la angla kiel lingvo de internaciaj kontaktoj. Eĉ en Sovetunio la plejparto de la lernejoj ĝin elektas kiel unuan fremdan lingvon, ŝi deklaris, parolante kompreneble en la hindia.

SAT ANONCAS KONGRESAJN PLANOJN

Rotterdam — La SAT-Junulfaka Postkongreso okazos de 10 ĝis 17 aŭgusto en la konferancejo De Hertenhorst, apud Delft, mezepoka provinca urbo en la apudeco de Rotterdam. La konferencio estos ideala loko ne nur por taŭgaj konsidoj kaj kunvenoj, sed ankaŭ por sportoj, naĝado kaj ekskursoj. Por detaloj turnu al: f-ino Corrie Kooij, Franselaan 270b, Rotterdam 7, Nederlando.

Esperanto en skolta tendaro.

El Anglujo oni informas, ke fama skolta komisaro, kiu jam plurfoje organizis internaciajn skoltajn tendarojn, ekkomprenis, ke la angla lingvo ne sufiĉas dum tiaj tendaroj. La eksterlandaj skoltoj kiuj alvenas, ne sufiĉe regas la anglan lingvon, kaj la dezirata kontakto ne efektiviĝas. Tial li — kiu ne estas esperantisto — kontaktis la Skoltan Esperantistan Ligon, aĉetis stokon da kursoj, organizis, ke esperanto estu dua lingvo de la tendara gazeto, estu uzata dum diservo ktp dum granda internacia tendaro en Essex dum tiu ĉi somero.

Oni jam scias, ke skoltoj alvenos el pluraj landoj, inter kiuj Norvegujo. La komisiito por skoltoj jam kontaktis la skoltan ĉefkontoron, la eksterlandan komisaron de Norsk Speidergutt-Forbund kaj la skoltestron, kiu gvidos la norvegan trupon al Anglujo. Tamen tio ne sufiĉas. Nun estas la devo de ĉiu opa esperantisto, kiu konas knabon, kiu estas skolto, kontakti la knabon, sciigi al li pri la leterkurso de NEL, kiu por la skolto kostas nur 6 kronojn, kaj informi lin pri la tendaro, pri S.E.L., kaj doni la adreson de la Nacia Reprezentanto de Skolta Esperantista Ligo en Norvegujo, H. A. Rosbach, Nergaten 37 c, Kristiansund N.

Skolta Esperantista Ligo jubileas.

Skolta Esperantista Ligo fondiĝis en 1918, kaj tiel havas sian oran jubileon dum tiu ĉi jaro. Oni ne planas iujn ajn jubileajn aranĝojn, sed jam ĝojas, ke kelkaj esperantistoj kaj simpatiantoj donacis jubilean mondonacon al la ligo. La celo de tiu ligo ja estas membrigi kaj esperantistigi geknabojn, kaj la rimedoj por tio plejparte estas presaĵoj — kiuj estas multekostaj — dum la membraro konsistas el junuloj kaj geknaboj, kiuj ne estas monhavantoj. La ekonomio de la Ligo tial estas trege malfacila, kaj la plej bona maniero celebri la jubileon estas igi ĝin ora en dua senco.



På norsk

General Franco beskytter for Esperantistenes Verdenskongress.

Spanias statssjef, general Franco, har stilt seg som beskytter for Den 53. Verdenskongress for Esperanto, som skal holdes i Madrid 3.—10. august. Bare én gang tidligere har verdenskongressen vært i Spania; det var den 5. verdenskongress i Barcelona i 1909.

Spania har en særlig virksom Esperanto-bevegelse, som holder egne kongresser med mange deltakere hvert år. Ellers har Spania i de siste år gjort seg bemerket i Esperanto-verdenen ved at en vesentlig del av den litteratur som er utgitt på Esperanto siden siste verdenskrig, er utkommet på spansk forlag. I flere år har det vært forholdsvis få deltakere fra Spania på verdenskongressene. Årets kongress vil gi en kjærkommen anledning til kontakt mellom spanske og utenlandske esperantister.

Som vanlig skal mange internasjonale forbund som benytter Esperanto som kontaktspråk, ha egne møter under verdenskongressen. I tilslutning til verdenskongressen arrangeres Den 36. Internasjonale Kongress for Blinde Esperantister, Den 11. Internasjonale Barnekongress og Den 4. Internasjonale Kunstfestival. I kongressuken blir det forelesninger på Esperanto ved Det Internasjonale Sommeruniversitet.

Skandinaviske Esperantoforbund forbereder en felles flyreise til kongressen med en ukens opphold før kongressen på Costa del Sol. Norske esperantister kan bli med på turen og kongressen uansett om de er medlemmer av Norsk Esperanto-Forbund eller ikke.

Ungdomskontakt på Esperanto over landegrensene.

I en rekke land har unge esperantister i de siste år startet sine egne forbund, som gjerne tar initiativet til internasjonale

nale kongresser og stevner for Esperantoungdom. Stevneaktiviteten får større omfang i 1968 enn noe år tidligere; særlig i april i år har reiselystne unge esperantister litt å velge mellom.

Fra 3.—7. april er det Internasjonal Kulturfestival i Dunaujvaros, arrangert av Ungarske Esperanto-Ungdom. — Samtidig er det Internasjonalt Esperantoseminar ved universitetet i Torún i Polen. — I dagene 6.—13. april foregår Det 13. Internasjonale Ungdomstevne i Aachen, arrangert av Tysk Esperantoungdom. — Fra 10.—14. april holdes Det 4. Stevne for Europeisk Esperantoungdom i Montecatini i Italia. — Endelig innbyr Polsk Esperantoungdom til sin Første Internasjonale Kulturfestival i Sierakow 28. april—1. mai.

Den enkelte sammenkomst får nok mest tilslutning fra møtelandet og fra nabolandet; men det pleier også å komme endel tilreisende langveis fra.

Esperanto i kringkasting fra Filippinene.

Radio Manila på Filippinene har satt i gang sending på Esperanto. Sendingene går på 25-meterbåndet torsdag kl. 12—12.15 og søndag kl. 22.45—23 norsk tid og tar i første rekke sikte på østasiatiske lyttere.

Radio Peking har alt hatt regelmessige senderinger på det internasjonale språket til Europa, Sørøst-Asia og Øst-Asia i tre år.

Demando al s-ro A. Sekelj.

En sia kritika artikolo-letero en la numero tria de nia gazeto skribas, en la fina alineo:

«Se mi jam kritikas, permesu rimarkon ke en la sama revuo sur p.30 estas multaj preseraroj en la nomoj de jugoslavaj lokoj.»

Sinjoro Sekelj, ĉar vi kritikis, mi permesas al mi etan demandon: Ĉu la alineo ne devus komenciĝi per la vorto ĉar anstataŭ se? Se signifas «Kondiĉe Ke», kaj tio ne taŭgas ĉi tie, dum ĉar montras motivigon aŭ klarigon, kiun s-ro Sekelj ĝuste celas!

Mond.

6.
Krucon ili nun eklevas,
ho animo, en memor',
ĉiam vi konservi devas
la suferojn de l' Sinjor'.
Akraj najloj, akra glav'
pretaj estas; peka sklav'
kredas, ke per la doloro
venos nun plej granda gloro.

7.
Li soifas, sed ricevas
netrinkeblan vinon nur.
Ankaŭ tiel ili devas
humiligi Kriston sur
kruco dum la morta hor'.
Kia moko! Al la kor'
tio estas ja maljusto
kiel la acida gusto.

8.
Laŭ la kruco ili tiras
Lin. La roma armean'
per martelo najle ŝiras
tra piedoj kaj tra man'.
Per malvarma najla fer'
pendas alte super ter'
en sufero, en doloro,
nun Jesuo, la Sinjoro.

9.
Vidu, kiel Lia forto,
kiel la malforta spir',
malpliigas ĝis la morto
de la sangoplana vir'.
Preskaŭ trostreĉiĝas en
Lia brako la tenden',
dum kovriĝas per nebulo
sangoplana la okulo.

10.
Graco nun nenie estas,
kaj ne helpo, savo; ne,
senkompataj ĉiuj restas
dum la lasta, forta ve'.
Eĉ se sangas Lia plor'
ne kompatas Lin la kor'
de la homoj, kies ĝuo
estas veoj de Jesuo.

11.
Tamen restu en pripenso
kiuj pasas tie ĉi,
ĉu vi povas en la menso

iam rememori pri
homo, sur la vasta ter'
kiu kvazaŭ en infer'
suferegis sub malbeno,
moko, honto, pekveneno.

12.
Kaj la novan mokon vidu:
Inter du rabistoj nun
la senpeka Di-ŝafido
pendas sub la arda sun'.
Tie pendas inter du
krimeguloj mia ĝu',
mia vivo, mia gloro,
beateco kaj honoro.

13.
Aŭdu, Li al Patro sia
ĝeme preĝas, ke Li ne
punu per kolero Dia
la popolon sian, se
ili blinde agas nun,
graco regu, ne la pun',
al la vivo ilin gvidu,
ke al Vi la judoj fidu.

14.
Skribas sur la kruc' Pilato
«Juda reĝ' el Nazaret».
Spite al popolmalŝato
tio staru sur la bret'.
Kaj eterne restos ĝi —
turmentita Fil' de Di'
sur la kruco nun Li mortas,
reĝan nomon nun Li portas.

15.
Skribu do sur mia koro
nomon Vian, ho Jesu',
ke nek honto, nek honoro
Vin de mi disigu plu.
Ĉisu en malmola kor':
«Jesu' Kristo, mia glor',
krucumito mia forto,
savo sola dum la morto.»

16.
Ankaŭ tion Kristo vidas
en la peza morta hor',
ke soldatoj nun dividas
la vestaĵojn de l' Sinjor'.
Post diskuto kaj kverel'
ili venas al mantel',
kaj decidas luda veto
en ilia kuboĵeto.

17.
Se mi iam sur la tero
iĝos nuda, povra, mi
tamen vivos en espero,
ĉar mi forte fidas pri
la promesoj de Jesu',
kaj en la ĉiela ĝu'
min Jesuo brile kovros,
tiam mi neniel povros.

18.
Vin l'amaso nun minacas,
mokas Vin pro Via ve',
aĉe per la buŝ' grimacas,
kvankam ili staras ĉe
Via sanga kruc', Jesu',
tamen aŭdu tra la bru'
mian preĝon kaj min benu,
en ĉielon min kunprenu.

19.
Post la vortoj de l'rabisto
kiu pentis kaj al Vi
turnis sin, Jesuo Kristo,
Via am' parolis pri
hejmon alte en ĉiel'.
Ankaŭ min Vi prenu el
peka mondo, kaj al fido
iru mi sub Via gvido.

20.
Sed, Jesuo, dum mi iras
al la loko de Mari'
sub la kruco, ĉiam miras
mi, ĉar sian filon ŝi
devis vidi dum dolor'.
Kiel sangis ŝia kor'
pro la honto, pro sufero,
pro la moko, pro l' mizero.

21.
Nun neniu povas diri
kiel tiu glavo sin
kruelege devas ŝiri
en la koron de l' patrin':
Kien ajn ŝi vidas dum
ŝia filo en krucum'
en suferoj grandaj pendas
la rigard' dolorojn sendas.

22.
Ŝin defendi l'apostolo
devas, diras nun Jesu',
kaj pro tiu Lia volo
gustas guton ŝi da ĝu'.

Ho, se povus mia fid'
same resti ĉe l'ŝafid'
kiel ili en trankvilo
fidas nun al sia Filo.

23.
Eĉ funebras nia suno,
kovras sin, ne lumas plu,
terurigas pro la puno
de l' Sinjoro Krist Jesu'.
En timige vokas Li:
«Kial nun, Eli', Eli',
Dio mia, Vi forlasas
min dum mi al morto pasas?»

24.
Ho, okulo, suno mia,
mallumiĝu en dolor'
pro la peka viv' malpia,
kovru vin la penta plor'.
Forlasita en infer'
estas Li, kaj la esper'
pri pardono mia estas
ĉar Li tiel sola restas.

25.
Li soifas. Al la buŝo
spongo kun acida vin',
kaj post ties nura tuŝo
lipoj tuj malfermas sin,
kaj li vokas: Al plenum'
venis mi. La tuta sum'
de la pekoj de l' Adamo
dronas nun en mia amo.

26.
Kaj denove la Sinjoro
vokas raŭke al ĉiel':
«Patro Dio! Jen la horo,
prenu la animon el
tiu mondo kaj al Vi.»
Klinis kapon la Mesi'
kaj per sia viv-ofero
pagis pekojn de la tero.

27.
Kristo mortas, tremblas tero!
Tremblu ankaŭ mia kor',
ho deziroj el infero
nun vi devas iri for!
Ĉar nun pagis Di' kaj hom'
pro la dento en la pom',
pro la homa peka emo
iris Li al morta premo.

28.

Jes, Jesuo, nun mi ploras
pro la pekoj de l' anim',
sed kun ĝojo mi memoras
ke al morto mi sen tim'
povas iri, ĉar en mort'
kaj en vivo Via fort'
min el tera tomo gvidos
ĝis mi la ĉielon vidos.

29.

Ho Jesuo, se dum morto
povus mi foriri per
sama preĝo, sama vorto
kiel Vi, for de la ter'!
Tial klinu Vin al mi
dum ŝvitplena agoni',
venu Vi kun kis-saluto
dum la lasta viv-minuto.

Tradukis H.A.R.

RECENZOJ

Moderna Germanujo

Helmut Arntz: Faktoj pri Germanujo. Tria ĝisdate aktualigita aldono. Eldonita de la Gazetara kaj Informa Oficejo de la Federacia Registaro de Germanujo.

La 94-paĝa, broŝurita libro kun bildoj, tabeloj, landkartoj kaj simboloj estas valora fonto por ĉiu, kiu serĉas informojn pri Germanujo. Certe, eĉ tiu ĉi tria eldono ne estas tute ĝisdata, ekz. kiam temas pri la registaro de la Federacia Germanujo. Kaj politike ĝi sekvas la oficialan okcidentgermanan politikon, kiu ne agnoskas la dividigon de Germanujo en du ŝtatojn, sed preparolas la orientan parton kiel «tiun parton de Germanujo, kiu fariĝis Sovjeta Okupacia Zono» . . . «kiun la okupacia potenco nomis «Germana Demokratia Respubliko» (DDR).» La libro rakontas pri la grandnombra transloĝado el Orienta Germanujo post la starigo de la Muro, kaj entute neniel estas politike neŭtrala.

Ankaŭ la tabeloj pri la ekonomio estas tro malnovaj. Tamen la artikolo pri ekonomio estas same interesa, dum ĝi rakontas pri la diversaj flankoj de la germana ekonomia vivo de post la ruiniĝa milito ĝis 1963, kaj interese ankaŭ estas legi pri la evolu-helpo, kiun donas Germanujo nun (paĝoj 50—51). Ankaŭ por la kultura agado kaj por la religio estas vasta loko en la libro. Kaj sub tiu rubriko oni trovas informojn pri la nun 18 000 judoj, kiuj vivas en Germanujo, kunigitaj en 73 judaj komunumoj. «Ree ekzistas proksimume 2 000 judaj metiistoj kaj 300 advokatoj, sed ankaŭ konsiderinda grupo da artistoj. . .»

Do entute rekomendinda libro. La prezo estas indikita je 4 DM, sed ĉu oni ne povas ricevi ĝin senpage ĉe la germana ambasadorejo. Almenaŭ estas saĝe skribi tien por informiĝi pri la libro.

R.

Bonega lernolibro

Konversacia Esperanto — kurso de d.ro Szilágyi. Eldonis Dansk Esperantoförslag, Aabyhøj prezo proks. 8 kronoj.

Jen bonega lernolibro! Ĝi estas laŭ la antaŭvorto por tiuj kiuj volas ekzerci la lingvon per konversacio, kiuj jam havas lernolibron aŭ almenaŭ ŝlosilon. Mi volas aserti ke ĉi tiu libro estas tiom klara kaj bona, ke oni mem povas studi laŭ ĝi, legante la demandojn kaj mem respondante. Kompreneble, se oni estas kune kun aliaj en studrondo oni povas havi eĉ pli da utilo de ĝi.

D.ro Szilágyi prezentis sian metodon jam antaŭ 30 jaroj, kaj legante la libron hodiaŭ oni povas nur kun admira konstati ke la tempo ne malmalmodernigis ĝin. Kontraŭe: La libro estas bona laŭ pedagogika vidpunkto, amuza, enhaviĉa kun multe da vortoj kaj esprimoj. En bonega maniero la aŭtoro enkondukas la diversajn gramatikajn regulojn. Aĉetu ĝin, kaj studu ĝin, por novuloj kaj por tiuj kiuj jam estas esperantistoj ĝi estas valora libro, ĝi donas bonegan ekzercon en la konversacia arto.

Elna Matland.

Poezia preho

Teo Jung: Preĝo. 16-paĝa kajero kun pli fortika kovrilo. Numeritaj ekzempleroj kun aŭtografio de la aŭtoro. Prezo gld 1.50. Eld. Heroldo de Esperanto.

Malgranda, bela kajero kun versaĵo (Jung mem ne volas nomi ĝin poemo) en kvar partoj: «Ho donu al mi mil okulojn», «Ho donu al mi mil orelojn», «Mil fortajn brakojn al mi donu» kaj «Ho donu al mi vastan koron». Certe la lasta parto estas la ĉefa, kaj ĝi ankaŭ donis subtitolon al la kajero. Tiu vasta koro donus lokon al ĉiuj belaĵoj de la mondo, kiujn la okulo povus vidi kaj la orelo povus aŭdi, sed ĝi ankaŭ vere bezonus la fortajn brakojn por esti helpo je ĉiu mizero kaj neceso.

Jung sugestas, ke la «kompozicio en versoj» estu deklamata dum klubvespero de kvar — du el ambaŭ seksoj — personoj. Certe ĝi bone taŭgas, precipe se oni ankaŭ povus doni al la kromaj programeroj la praktikan, bonfaran enhavon al kiu montras la «preĝo».

Lingve ĝi estas, kompreneble, senmakula.

Haro.

Fabela bildkajero

Magia Peniko. Teksto de Hong Suntu, Bildoj de Van Lajming. Eldonis Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1965.

Mi ĉiam miris, kiam vidis tiujn belajn, multkolorajn felbela-bildkajerojn, kiujn la ĉinoj eldonas en nia lingvo. Jen fabelo pri malriĉa ĉina knabo, paralelo al nia Cindrulo, kiu emas desegni. Sed la mandareno — komparu la malfablajn kaj kruelajn reĝojn en la norvegaj popol-fabeloj ne volas helpi. Dum la knabo de feo ricevas magian penikon, la mandareno volas ĝin por profiti el ĝi, dum la knabo nur volas helpi la malriĉulojn. Kaj jen — knabo malliberigita fine promesas desegni ion al la mandareno, kaj, kompreneble, per tio grandioze venkas.

Eĉ ne signo da propagando, sed kajero kiun vi senhezite povas meti en la manojn de viaj infanoj.

H.A.R.

Esperanta stenografio

J. J. Sturzenegger kaj H. Matzinger: *Unesteno Universala Esperanta Stenografio*. — Eldonejo Mondo, Lernolibra Fako, Rothstrasse 7, CH8057 Zürich 6, Svislando. — 294 paĝo (el kiuj la 8 lastaj en aldonita elprenibla kajero), 15 x 21 cm. — Prezo de la volumo, bindita: 21 sv. fr.

La vivo konsistas el aro da malhelpoj, kiujn oni devas venki. Antaŭ tiuj malhelpoj, la homo reagas inventante ilojn, kiuj faciligas la lukton kontraŭ tiuj baraĵoj. La sumo de tiuj faciligiloj kreitaj de la homo konsistigas la kulturon.

La esperantista kulturo — kaj sekve la tuthomara, el kiu Esperanto estas konsistiga ero — ĵus riĉiĝis per unu el tiuj faciligiloj, kiujn postulas la ĉiutage pli kaj pli nin rapidiganta ĉirkaŭmondo: stenografio propra. La amo al Esperanto de nia samideano Sturzenegger, apogita sur lia faka kompetento kaj tiu de S-ro Matzinger pri stenografio, donis al ni la kape priskribitan libron, kiu aldone estas unu el la plej belaj iam ajn produktitaj en Esperantujo. Per ĝi, krome, debutas en la Movado nova eldono, sidanta en Svislando. Se mi aldonas, ke la libro estas originale verkita en Esperanto kaj aperas sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (USA) kaj de Instituto por Esperanto en Komercokaj Industrio (EKI), mi certe apenaŭ povus aldoni aliajn eksterajn rekomendojn.

Pri la enhavo mi estas tute laika; sed se juĝi laŭ voĉo de fakuloj, ankaŭ el faka vidpunkto temas pri vere atentinda kontribuo ne nur al la Esperanta, sed ankaŭ al la ĝenerala stenografio. La libro estas fundamente orientita al meminstruado, kaj tio estas alia ĝia elstarajo, ĉar ordinare stenografiaj ler-

nolibroj estas aranĝitaj por klasĉambroj. Tiel, post 24-paĝa sojlo kun glosaro kaj skribteknikaj instrukcioj, venas la unua el la du ĉefaj partoj, kiuj konsistigas la metodon, nome *Koresponda Skribo*, tra 61 ĉapitroj, el kiuj la 41 lastaj estas perfektigaj. Tuj sekvas la dua parto, *Rapida Skribo*, kiu ampleksas 67 ĉapitrojn. El pedagogia vidpunkto la libro ŝajnas al mi ja eminenta (mia laikeco devigas min uzi la vorton «ŝajnas»), ĉar ĝi adaptiĝas al la 3-ŝtupa lernoprocezo de Pestalozzi: *rigardi — pensi — agi*, kaj estas aldone aranĝita laŭ la metodo de *programita instruado* kaj laŭ la principo de *la facila al la malfacila*.

Laŭ mia kompreno, Universala Esperanta Stenografio (unesteno) estas misia laboro, kiu pioniras preskaŭ virgan kampon de nia propra kulturo. Kiam mi montris la libron en mia Universitato al homoj kun tiufakaj interesoj, ili ĝin admiris kaj laŭdis, sed ne malĉefe impresis ilin, ke Esperantujo estas tiel fortika kaj serioza «lando», ke ĝi povas aldoni al la faka literaturo stenografia tian produkton. Sekve do mi povas aserti, ke la libro *unesteno* estas bela rezultajo de ama krea laboro plenumita de du kompetentaj spertuloj, kiuj, per ĝi, digne aŭtoritatigis nian Movadon en la monda kadro de la stenografia didaktiko. Al ĉiuj esperantistoj, sed ĉefe al interesitoj pri rapidskribado, mi povas nur rekomendi la libron per duonparafrazo el vortoj de la frumezepoka romhispana klasikulo Isidoro el Seviljo: *Sunt hic multa bona: tolle, lege!*

J. Régulo Pérez.

Granda novelaro

Johan Hammond Rosbach: La mirinda eliksiro. Eld.: Dansk Esperanto-Forlag. Åbyhøj 1968. 99u., 15 x 21 cm, broŝ.
Prezo: 10 d. kr.

Por la tria fojo Rosbach prezentas novelaron originale verkitan en Esperanto. Lia unua, *Bagatelaro* (1951), rikoltis meritan aprobon. Lia dua, *Homoj kaj Riveroj* (1957), montris ankoraŭ pli da maturiĝo kaj vastiĝo de lia talento. Kaj jen lia tria novelaro kuŝas tute freŝa

sur la vendotablo. Novelaro, kiu atestas, ke Rosbach hodiaŭ estas nun el niaj plej eminentaj novelistoj, samrange kun Baghy, Szilágyi kaj Rossetti!

«La mirinda eliksiro» konsistas el entute 14 noveloj. La noveloj estas interesaj kaj pensigaj, kaj ili ĉiam kaptas la atenton de la leganto. Scenoj kaj medioj rapide ŝanĝiĝas: jen oni estas en lerneja korto, jen en Pariza restoracio; jen en malriĉa domo en la foraj Apeninoj, jen en operaciejo de granda hospitalo; jen survoje al la Nacia Teatro por rigardi teatraĵon de Ibsen, jen staranta antaŭ faŭko de pistolo en banejo de kantistino. Same ankaŭ la temoj ŝanĝiĝas de eŭtanazio ĝis striptizo, de netiĝo de matematikaj hejmtaskoj ĝis okulfliro en aŭtobusa spegulo, de geedza feliĉo en la hejma sino ĝis amoro kun leĝeraj knabinoj en nokta trinkejo.

Rosbach nepre havas naturan talenton por rakontado, kaj li ĉiam trovas — eĉ en la ordinara, ĉiutaga vivo — kontentige da impresokreaj aferoj, kiujn aliaj tute ne observus. En unu lia novelo li diras pri si mem, ke li ĉiam estas observema, kaj ke li ŝatas observi detalojn kaj bagatelojn. Kaj Rosbach lerte scias kunmeti la erojn kun tiu dinamiko en la sinsekvo, kiun oni trovas nur en alt-nivela literaturo.

El la noveloj en «La mirinda eliksiro» plej plaĉas al mi persone la noveloj «Feliĉo», «Vero», «La ruĝa slipo» kaj «Pierre konis la kantistinon».

Enkonduke D-ro Ferenc Szilágyi donas tre interesajn informojn pri la aŭtoro mem. Ĉi tiu enkonduko verŝajne estis la lasta literatura laboro, kiun Szilágyi faris antaŭ sia tro frua forpaso.

La lingvaĵo — zorge kontrolita de la Literatura Komitato de SAT — estas senriproĉa, bonstila, flua kaj glata. Estas evidente, ke Rosbach majstre regas nian lingvon. Tamen kelkaj rimarkoj: anst. «respondis ne» legu «respondis, ke ne» (27); anst. «vinklo», «radio» kaj «tangento» legu «angulo», «radiuso» kaj «tanĝanto» (65); anst. «gracila» legu «svelta» (85); anst. «enparkiĝo» legu «parkado» (88) kaj anst. «enparkigi» legu «parki» (90).

En 1951 Rosbach lanĉis la vorton «maltro», sed ĝi ankoraŭ ne trovis

La ORA KRIZO

ORAJ PESPEKTIVOJ ĤIMERAJ POR NORVEGUJO

La mondfama profesoro sveda Borgström, ekde 1954 profesoro ĉe «Michigan State university, East Lansing, Michigan» profetas ke la oro baldaŭ finludis sian rolon kiel valormezurilo. Ĝi estos anstataŭata de la proteino — albumeno — kaj el tio povus rezulti ke Norvegujo kun siaj grandegaj rimedoj pri proteinoj en siaj fiŝoriĉaĵoj fariĝos unu el la ĉefaj ekonomiaj potencaj regnoj de la mondo.

La profesoro inter alie verkis la libron «Nutraĵo por Miliardoj». Li akcentis, ke nia plej grava hodiaŭa problemo estas kiamaniere oni utiligu niajn rimedojn por havigi nutraĵon — post 30 jaroj la loĝantaro de la mondo estos 8 miliardoj da homoj — por ĉiuj. Kiel nutraĵon oni konsideru ankaŭ akvon, kaj la profesoro substrekas, ke la monda provizo da akvo ne sufiĉas. Estas necese utiligi teknikajn metodojn por havigi pli. Kiel kuriozan ekzemplon li mencias, ke homoj en la grandurboj en Ameriko hodiaŭ trinkas vespere tiun akvon, kiu estis verŝata en la klozeto-pelvetojn matene — dank' al modernaj purigaj metodoj.

Laŭ artikolo en
Stavanger Aftenblad
Rudolf Dreyer.

aprobon ĉe la esperantistaj aŭtoroj. Laŭ mi la vorto estas neĝogika. Anstataŭe oni preferu uzu «ne sufiĉe» aŭ «tro malmulte».

Male la neologismo «striptizo» tre plaĉas al mi, ĉar ĝi anstataŭas la ĝisnunan terminon «senvestiĝa danco», kiu estas neadekvata kaj maltrafa. Alia afero estas, ke ĝis hodiaŭ la profesio «striptizi» estas rezervita nur al virinoj, sed la vorto «striptizistino» inkluzivas ankaŭ la ekziston de «striptizisto»! Kiu vivos, tiu vidos . . .

La eldonisto meritas laŭdon pro bona papero kaj bela tipografio, tamen la kovrilpaĝo ne tute plaĉas al mi, sed tio ja estas demando de gusto. Preseraroj preskaŭ ne ekzistas. Mi trovis nur 6, kaj ili neniel ĝenas la legadon.

Sum: la novelaro estas treege rekomendinda, kaj malgraŭ ĝia modesta vesto, ĝi estas granda novelaro.

Lars Kåre Hummes.

Che la morto de Arnulf Overland

LA CENT VIOLONOJ

Printempon posedu la koro eĉ plej mizera.
Maldormos stelo super la voj' senespera.
Alvenos sonĝo al ĉiu dormejo surtera.

Nin ĉiuj atendas post vana tag'
la horo de gracia doloro.
Ho, kiom vidos, komprenos l'imag'
en ĉel' ĉe kandela oro

Panĝelon Funebro en sia ag'.

Kaj iam alvenos la sankta hor'
dum ŝanĝos l'eternaj sordinoj
la plej amaran de via kor'
al centoj da violonoj.

Esperante reverkita de H.A.R.

Kie boacoj vagadas

de Eija Salovaara
Originala verko el Finnlando
Kr. 11,00 + sendkostoj (10 %)
Eldonejo Esperanto, Boks 942, Oslo 1



FERVOJISTA PAHO

Peter Petersen

LA UNUA PREZIDANTO DE NORVEGA FERVOJISTA SINDIKATO

Tradukita de Magnus Carlsen.

Kuntige kun la jubileo okaze de la 75a datreveno de la fondiĝo de la Norvega Fervoja Sindikato la 20an de novembro 1967, skribis la direktoro de la Norvega Fervojmuzeo, Arvid Østby, jenon:

Li naskiĝis en Kristiania (nun Oslo) la 23an de aprilo 1855. Li estis dungata kiel telegrafisto la 1an de julio 1873, avancis al kontoristo la 11an de majo 1874, al staciestro ĉe Ås stacio la 1an de decembro 1878, translokiĝis en la sama ofico al Grefsen la 22an de januaro 1900, same al Ski la 31an de marto 1905. Li finis sian deĵoron kaj emeritiĝis la 23an de julio 1920. Li mortis la 14an de julio 1930. En 1905 estis Grefsen stacio en la 6a klaso kaj Ski stacio en la 5a klaso. Sed Ski altiĝis al la 2a klaso antaŭ ol Petersen finis sian deĵoron.

Petersen havis sian lernejan tempon en tiel nomata «Pag-lernejo» kaj prenis pli poste privatinstruadon por prepari sin por aniĝo ĉe la Milita lernejo. Li havis emon fariĝi oficiro. Sed kiam lia patro mortis, li estis devigata rezigni tiun planon, kaj devis mem ekgajni monon. Unue li fariĝis telegrafisto ĉe la Regna Telegrafo.

En 1873 okazis sur la Kongsvinger-linio kolizio kaŭzita pro mankoplana prizorgado de la telegrafo. La fervoja administracio momente eksentis bezonon de elkreskintaj deĵorantoj por la telegrafdeĵoro anstataŭ la malplijaruloj, je kiuj la administracio ĝis tiam estis kon-

tenta. Petersen aspiris pri deĵoro ĉe la fervojo, kaj estis dungata kiel telegrafisto ĉe Sander stacio, kie li restis nur cirkaŭ unu jaron. Poste li fariĝis kontoristo ĉe Kristiania (Oslo) stacio kaj estis anstataŭanto kelkajn jarojn en diversaj oficoj ĉe la trafiko ĝis li je la malfermo de la Småens-linio fariĝis staciestro ĉe Ås stacio. Tiun oficon li havis entute 22 jarojn.

Li estis konata kiel eminente taŭga kaj energia fervojisto. Ekzemple li estis unu el la unuaj, kiuj ricevis stipendion por studadoj ĉe eksterlandaj fervojoj.

Tamen kiel fakunuigulo li fariĝis plej konata. Li estis arde interesita por sociaj demandoj kaj speciale por tio, kio koncernis la fervojistaron kaj ĝia personaro. Li estis parolanto kaj skribis en la Fervoj-gazeto. Kelkfoje li estis iom «malmolmana» en siaj argumentoj, kiel la redaktoro esprimis pri li. Petersen estis tio, kion ni nomas «akra virulo», kiu rekte eldiras sian opinion.

Kiam la demando stariĝis pri kuniĝo de ĉiuj fervojaj fakunuigoj en unu sindikato fariĝis Petersen fervora partoprenanto dum la pritraktadoj. Estis stariĝanta komitato por prepari la fondiĝon de sindikato, kaj Petersen estis elektata kiel membro de la komitato, kiu partigis sin en du frakciojn. La plimulto sub gvidado de Petersen, volis bazi sin sur la unuigoj en la distriktoj, dum la malplimulto sub gvidado de Jens Arnt Hansen en Hokksund, volis havi unu unuigon,

kiu devis ampleksi la tutan landon. Fine estis Hansen sola kun sia unuigo; sed li tamen alvenis al la fonda kunveno por defendi sian starpunkton. Fariĝis akra reparolŝango inter la du staciestroj; sed Petersen venkis, kaj estis elektata kiel la unua prezidanto de Norvega Fervoja Sindikato. Tiun konfidkomision li havis dum kvar jaroj sub malfacilaj rilatoj. Ne bona unueco inter la personaro kaj malkomplezaj aŭtoritatoj, kiuj vidis kun malfido al ĉiu unuigo.

Unu el la plej gravaj aferoj, kiujn sukcesis al la Sindikato realigi dum la tempo de Petersen, estis la fondiĝo de la Asekura Kaso kontraŭ fajro. Petersen estis la unua, kiu antaŭmetis la ideon jam tiel frue kiel en 1887 dum estrarkunveno de la Sud-linia Staciestra Unuigo. Tiu unuigo elsendis alvokon pri la afero; sed la realigo de ĝi progresis tre malvige. Taŭga aŭtoritato devis prizorgi la aferon, kaj tio okazis post la fondiĝo de la Sindikato kun Petersen kiel prezidanto. La laboro estis ekfunkciigata serioze. Kaj en 1895 fondiĝis la Asekura Kaso kontraŭ fajro kiel sekcio de la Sindikato. Tiel fariĝis Petersen ankaŭ la unua prezidanto de la Asekura Kaso kontraŭ fajro, kaj ricevis la polison numero 1.

Kiel konate la Asekura Kaso fariĝis pli poste memstara institucio. Ĝi estas eble la plej sukcesa entrepreno, kiun la fervojpersonaro realigis.

Petersen estis konata pro sia talento por rapide kaj klare prepari kaj antaŭmeti aferon. Lia aranga talento kaj lia ŝprucanta humoro estis ĉiam memorata de tiuj, kiuj kunlaboris kun li. Iu subulo ĉe Grefsen stacio karakterizis lin kiel «treege sagacan kaj akran en la reparolo». Cetere li estis orginalulo, kiu faris tion, kion li ekpensis. Cirkuladis multaj historioj pri li. Ĉe Grefsen stacio li rajdis ĉevalon sur la perono, kaj uzis varvagonon kiel stalon por la ĉevalo. Pro ia kaŭzo li ne ŝatis Hadelandulojn. «Pokker (estaĵo ekzistanta nur en la fantazio) devus veturigi Hadelandulojn. Ili devus pendi post la trajno en ŝnuro», li diris.

La unua edzino de Petersen estis filino de la staciestro ĉe la Orienta Stacidomo en Kristiania (Oslo), Molstad.

Tuj post la fondiĝo de Norvega Fervoja Sindikato, skribis «la verkisto de le fervojo», Hagbart Henriksen, poeziaĵon al Petersen. Ni rerakontos la unuan version (libere tradukitan proze):

Vi, la plej antaŭa en la lukto
nian dankon kaj saluton ricevu;
ĉar vi grande ekprenis la vorton
en nia afero.

Per juneca ardo kaj honoro,
per estra povo kaj fido
vi la luktan ŝarĝon portos
kaj oferos ĉiom vian ripozon.

La RUMPUDINGO

NOVELO DE WILLY BREINHOLST

Pasis longa tempo inter ĉiu fojo, kiam lektoro Mallerhøi invitis sian edzinon iri en restoracion tagmanĝi, sed s-ino Karen Mallerhøi trovis tute laŭorde, ke estos tiel, ĉar ŝia edzo estis terura kverelulo. Ĉiam li devis elpensi ion aŭ alian por kvereli. Jen estis la supo tro varma, jen ĝi estis tro malvarma, jen la kelnero kalkulis unu kronon tro malmulte aŭ tro multe. Ŝajnis al la sinjorino, ke estas terure malagrabla tiom da kverelado. Tial ŝia respondo ne venis surprize, kiam lektoro Mallerhøi iun vesperon proponis, ke ili irus en restoracion tagmanĝi.

«Nur je unu kondiĉo: ke vi ne faru bruon!»

«Certe la kelnero vere kunkalkulis la daton lastfoje. Vi ja ne povas postuli, ke mi lasu min esti trompata tiamaniere. Iĝis sufiĉe multekoste malgraŭ tio.»

«Mi nur postulas, ke vi solene promesu al mi ne plendi pri io ajn ĉi tiun fojon... se ne, mi restos hejme. Ni havos fiŝstufajon.»

Lektoro Mallerhøi ne povis toleri fiŝstufajon. Estis tute simple la plej malbona manĝo, kiun li konis.

«Bone,» li kapitulaciis. «Me ĵuras ke

mi ne diros eĉ unu vorton pri la manĝo . . . aŭ la fakturo. Nur manĝi kaj pagi.»

Jen ili iris en belan restoracion kaj mendis bonegan tagmanĝon por du.

«Hum!» s-ino Mallerhøi diris gustumante la testudosupon. «Franda, ĉe ne?»

Lektoro Mallerhøi ne respondis, nur jetis rigardon sur la manĝokarton. «Tortue Clair, aldonita konjako.» estis skribite. Li prenis plenkuleron, ĝin flarante, ĝin gustumante kaj ree ĝin flarante. Evidente li deziregis klarigi al sia edzino, kiel ankaŭ al la kelnero, ke tiu supo ne estas interne de la atingodistanco de botelo da konjako, eĉ ne konjako, el la plej malmultekosta marko. «Franda, ĉu ne?»

«Mja . . . » li murmuris trinkante la supon silente.

Jen ili venis al la rostitaj ŝafidokotletoj, aranĝitaj tre apetitigante kun malgrandaj florbrasikoj, kradorostitaj tomatoj, kaŝtanpureo kaj kremsaŭco.

«Hum!» diris la sinjorino — «aspektas delikate, ĉu ne?»

La lektoro ne respondis. Li okupis sin pri eltirado de haro el de la kaŝtanpureo. Estis evidente, ke ne multo mankis, ke li eksplodos. Ruĝega je kolero li ĉirkurigardis pri la kelnero.

«Harald!» la sinjorino insiste flustris. «Vi certe memoras tion, kion vi promesis al mi, ĉu ne?»

Malvolonte la lektoro Mallerhøi lasis la malbonfaman haron fali surteren, silente manĝante sian ŝafidokotleton.

Je la rumpudingo, konvene ŝprucigita de Madejra vino kaj kun surŝutitaj juglandoj, li vere kurioze ne trovis mankon.

La cigaro kaj ankaŭ la konjako poste ŝajne benefikis al li, sed pri la mokakafilo li volonte dirus sian opinion al la koncerna persono. Tamen — ankoraŭ fojon li sukcesis sin regi.

Sed jen venis la fakturo. Li ĝin trastudis, ĝin adiciis ĉiudirekte, kontrolante, ĉu la dato estas enkalkulita, cetere li komparis kun la prezoj sur la karto. Ĉio evidente estis en ordo, . . . ne, subite li konvulsie streĉante la okulojn. Li sin maltrankvile flankenmovis sur la seĝo, la rigardo sencele iris de la sinjorino al la kelnero, de la kelnero al la sinjorino,

kaj de la sinjorino al la fakturo. Laŭ tio, kion ŝi povis kompreni pro lia vizaĝesprimado, li trovis ege gravan eraron, eraron, pri kiu devis esti protestata, kia ajn estos la prezo. Kaj kompreneble, sinjorino Mallerhøi konfesis al si mem, ke, se la fakturo estis tro alta, tiam estas nur ĝuste, ke li ricevos permeson por korekti la eraron.

«Se troviĝas eraro je la fakturo, Harald,» ŝi diris, «tiam nur alvoku la kelneron.»

Ĉi tion ne estis necese diri al li dufoje. «Kelnero!» li vokis, senpacience mansignante la kompatindan viron al la tablo.

«Sufiĉe multe okazis al mi en restoracio, sed tio vere estas la plej grava! Kaj tion oni toleru en restoracio reklamanta pri elektita unuaklasa servistaro.»

La kelnero ekrigardis la fakturon.

«Ĉu ne estas ĝuste, s-ro Mallerhøi?»

«Ĉu ĝuste? Jes, kompreneble estas ĝuste. Sed tamen estas malbone prezenti al mi, via maljuna instruisto, ion tian! Dio min gardu! Pensu: literumi rumpudingon per du d-oj!»

Rudolf Dreyer.

Tradukis

Norvega Kroniko

Red. Karsten Langsholt.

Klubo Esperantista en Oslo.

15/1. 68. La prez. John Berggreen deziris al ni ĉiuj bonan novan jaron kaj bonvenon al la kunveno.

Li informis ke la Esperanto-ekspozicio en la Hispana Ŝtata Turistoficejo en Stortingsgt. malfermiĝos baldaŭ.

Kiel kutime je la komenco de nova laborsezono la prez. hodiaŭ skizis la labortaskojn, dirante interalie ke la unua labortasko estas disvastigi la konon pri Esperanto inter la publiko — aktiveco en ĉiu signifo de la vorto. Se ni havus 100 aktivulojn en la klubo, ni povus fari multan propagandon. Ni bezonas pliajn membrojn, kaj plian partoprenadon en la klublaboro kaj ĉeestadon en la kunvenoj.

Nia vicprezidanto kaj propagandestro Thor Magnus Carlsen parolis «Iomete pri kafo». Li rakontis pri la origino, historio kaj disvastigo de tiu tre ŝatata frukto, pri la kvanto kiun la diversaj nacioj konsumas, pri la diversaj kvalitoj kaj uzeblecoj kiel trinkaĵo, kafo kun glacio, en kukoj ktp. Li ankaŭ disdonis specimenojn al ĉiuj ĉeestantoj, kelkajn saketojn por senpaga lotumado, kaj donacis kafon por trinki dum la kafopaŭzo.

Raportis Harda Danielsen.

La Esperantoklubo de Bergen.

25/1 1968. Kristian Sivertsen estis elektata kiel gvidanto. La bilanco de la pasinta jaro estis aprobata. La lastjaraj estraranoj petis sin liberigitaj, kaj ni elektis novan estraron.

La rezulto estis: Prezidanto, Åshild Birkenes. Vicprezidanto, Doris Birkelund, sekretario, Kristian Sivertsen, kasisto, Annemor Jæger Bye.

Anstataŭantoj, Kjell Offerdal kaj Lilly Davanger. Reviziistoj, Johan Dahl og Johs Jahren. Libro-komisiito, Jenny Jahren. La estinta prez. Elsa Værnor dankis pro amikeca kunlaboro dum la pasinta jaro. La novelektita prez. dankis pro la fido, kaj promesis dediĉi sian forton por vigligi la klubon, kaj esprimis sian dankon al s-ino Værnor por ŝia kluba agado dum la pasinta jaro.

Johs Jahren.

Grupo Esperantista de Trondheim.

El la aŭtuna laboro mi volas precipe mencii la festkunvenon okaze de la 60-jara jubileo de la Grupo la 19an de septembro, kiam s-ro Hunnes, nia prezidanto, faris paroladon pri la historio de la Grupo kaj s-ino Madeleine Haudebine, Hindujo, fariĝis honora membro «pro sia aktiva kaj merita laboro por Esperanta inspiro instruo de la Internacia lingvo al multaj homoj». En la Kristnaska kaj Zamenhofa festo la 12an de decembro s-ino Ragnhild Heggen-Aasen legis poemojn kaj f-ino Lif Berg faris la paroladon por Zamenhof. Dum la aŭtuna AOF aranĝis Esperantokurson kun s-ro Hunnes kiel instruisto. Kun granda dankemo la Grupo, en la pasinta jaro de s-ro Voltersvik ricevis lian libron de ĉirkaŭ cent volumoj en Esperanto.

En la jarraporto por la pasinta laborjaro estas menciita, ke Grupo Esperantista krom la jarkunveno aranĝis 12 ordinarajn kunvenojn, 1 eksterordinaran kunvenon, 2 festkunvenojn kaj 1 ekskurson. En la ordinaraj kunvenoj 9 okazis en hejmoj de membroj de la Grupo. La membronombro la lan de januaro 1968 estis 35 (el ĉi-tiuj 2 estis honoraj membroj). La jarkalkulo por 1967 bilancis kun la sumo kr. 1903,84.

En la jarkunveno la 30an de januaro elektigis la sekvanta estraro: Lars Kåre Hunnes, prezidanto, Arne Olav Mjøen, vicprezidanto, David Termén, sekretario, Kristian Fleischer, kasisto, Else-Margrethe Müller, studgvidanto, Anna Kolstø kaj Lif Berg, anstataŭantoj.

David Termén.

Kr.sand Esperantoklubb.

15/2 okazis jarkunveno. La elekto donis jenajn rezultojn. Prezidanto: Birger Reinertsen. Vicprezidanto: Helge Grøntoft. Sekretario: Sigurd Sørensen (nova). Kasisto: Jakob Lønne. Estraranoj: Maria Hauge (nova). Anstataŭanto: Elen Lønne.

Post la kafo Grøntoft vigle parolis pri superjaro.

J. Lønne.

Sauda Esperantoklubb.

2/2 en Sparebanksalen. La jarraporto, kiu montris viglan aktivecon dum la tuta jaro, kaj rakontis pri grandega aranĝo de la jarkunveno de NEL pentekoste, kaj ankaŭ pri 30 jara jubileo de la klubo, estis aklame aprobata. Same la kalkulaĵo. Oni reelektis la tutan estraron, nome: Johan Matland, prez. Olav Andersen vicprez. Elna Matland sekr. Eldrid Andersen kas. kaj Arthur Bjerke ano. Leif Berg supl. Ida Veka kaj Ågoth Bjerke estas revizoroj, Arthur Bjerke librokomiŝiulo, kaj Norman Birkeli gazarara repr. Radiorepr. estas Arthur Bjerke, prop. ĉefo Olav Andersen, kaj studgvidanto Elna Matland.

Olav Andersen dankis al la prez. pro bonega laboro farita dum la pasinta jaro. La prez. enkondukis al diskuto pri studrondoj, kaj demandis ĉu iu estas preta gvidi tiajn. Li ankaŭ proponis partoprenon en speciala studrondo, kiu koncernas la jaron por la homaj rajtoj. Bedaŭrinde

Korespondu!

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn kun esperantistoj en la tuta mondo. Josef Lanar, Sokolská 18, *Praha II.*, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi kun norvegaj geesperantistoj pri ciuj temoj. S-ro Petko Totev Petkov, str. Skobelevska 30 ap. 20, *Gabrovo* Bulgario.

la reago ĉe la partoprenantoj ne estas tre pozitiva, nur unu anoncis sin por aktiva instruo en studrondoj.

La kasistino ordigis pri bongustaj buterpanoj kaj kafo, kaj poste oni diskutis kiel labori por antaŭenigi Esperanton! Malnova, sed ĉiam bedaŭrinde aktuala temo, ŝajnas pli malfacile ol iam antaŭe, progresigi nian movadon. Fine la sekr. informis pri la kongreso en Madrid, kaj disdonis aligilojn. E. M.

MARA VENTO

28/9. La kunvenon malfermis la prez. bonvenigante la ĉeestantojn. Li informis ke lastatempe la estraro havis certajn malfacilaĵojn por trovi konvenan kunvenejon. La saloneto en Håndverkeren kiun la klubo pli frue luis, nun estas okupita de aliaj societoj. Sed oni sukcesis aranĝi ke ekde nun la klub-konvenoj estu en taŭga ejo de KFUK.

La prez. plue informis ke la kunvenotago estas ŝanĝita tiel ke nun estu la lasta ĵaŭdo de la monato anstataŭ la unua.

La programulo de la vespero estis O. Thormodsén. Li partoprenis la universalan kongreson de Esperanto en Roterdamo, kaj menciis ke li tie renkontis ankaŭ alian kongresantan klubanon, nome Ove Birkeland.

Li rakontis pri la kongreso kaj aŭdigis sonbendan intervjuon kun 11-jara nederlanda knabino kiu havas la esperantan nomon Feliĉa kaj parolas en klara kaj bone Esperanto. Plue O. Th. akompanis la aŭskultantojn al bela Tirolo en Aŭstrio kie li pasigis semajnon post la kongresfino. La rakontadon li akompanis per belaj kolorumbildoj. La ĉeestantoj dankis la programulon per kora aplaŭdo.

Lastan printempon du geklubanoj, Lovise Sortland kaj Steffen Kjetland, plenumis Esperanto-ekzamenon elementan kun bonaj rezultoj, kaj la prez. nun transdonis al ili la diplomojn kore gratulante.

La vesperon oni cetere agrable pasigis kantante, interbabilante kaj trinkante kafon kun bulkoj kiujn preparis du el la klubaninoj. Ref. O. J. R.

NI BEDAURAS

Ankaŭ n-ro 4 kaj 5/6 grave malfruigis. La kaŭzo estis malfacilaĵoj en la presejo en Elverum. Tiu presejo devis fine cedi la presadon, kiun nun transprenis la firmo A. Sæther en Hamar.

Red.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun

adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.

Telefona: 54 727